

“En du rangojn” interrompis la Falsa Kelonio “da fokoj, kelonioj, k.c. Poste, kiam oni formovis ĉiujn meduzojn—”

— “Kio ordinare konsumas multe da tempo” intermetis la Grifo.

— “Oni du fojojn antaŭen iras—”

— “Ĉiu kun sia kundancanta omaro” — ree interrompis la Grifo.

— “Kompreneble” konsentis la Falsa Kelonio—“du fojojn antaŭen iras, turniĝas kun la kunulo—”

— “Ŝanĝas la kunulon kaj reiras samvice” diris la Grifo.

— “Poste” la Falsa Kelonio rekomencis “oni ja ĵetas la—”

— “la omarojn” ekkriis ekscitite la Grifo, kaj saltis en la aeron.

— “Kiel eble plej malproksimen en la maron—”

— “Naĝsekvas ilin” la Grifo kriis, ankoraŭ pli ekscitite.

— “Renversas sin en la maro—” dirante tion eĉ la Falsa Kelonio saltis furioze sur la piedpintoj.

— “Denove ŝanĝas la kunulon—” Ĉi tiun fojon la Grifo tiel forte kriegis, ke ŝajnis al Alicio ke ŝiaj oreloj krevas.

— “Renaĝas al tero, kaj—jen la fino de l’ unua movado” diris la Falsa Kelonio. En tiu mo-

mento li subite mallaŭtigis la voĉon, kaj ambaŭ bestoj kiuj ĵus freneze ĉirkaŭsaltis, ree sidiĝis, kaj rigardis Alicion trankvile kaj tre melankolie.

“Ĝi nepre estus tre plezuriga danco por al-rigardi” diris Alicio.

“Ĉu vi volus vidi iometon da ĝi?” demandis la Falsa Kelonio.

“Ho, mi tre ŝatus ĝin” respondis Alicio.

“Ni do tradancu kune la unuan parton” diris la Falsa Kelonio al la Grifo, “la omarojn ni ja povos imagi. Kiu el ni kantos la muzikon?”

“Ho, vi kantu” diris la Grifo “ĉar mi forgesis la vortojn.”

Ili do komencis danci ĉirkaŭ Alicio. Ne malofte, pro tro apudaj paŝoj, ili piedpremis al ŝi la piedfingrojn. Ambaŭ markis la taktojn svingante la dekstran antaŭpiedaĵon; kaj tre malrapide, tre triste la Falsa Kelonio kantis:—

*“Ho, Limak’, vi plirapidu!” la merlango plende ĝemas;  
“Ĉar fokeno post ni sekvas, kaj la voston al mi premas!  
Kelonioj kaj omaroj je fervoro ĉiuj bolas,  
Kaj atendas vin sur sablo! Ĉu vi ankaŭ danci volas?  
Vi konsentas, ĉu ne vere? Vi konsentas partopreni?  
Vi konsentas. Ĉu ne vere? Ho, konsentu partopreni.*

*Ho, imagu vi la ravon esti supren altlevita!  
Esti kun omar’ kunulo for en maron forĵetita!”  
“Ne! Tro longen!” diris la limak’, skuante sin timeme,  
“Mi ne volas.” Al merlango do rifuzis li dankeme.  
Ja konsenti li ne volis, li ne povis partopreni,  
Ja konsenti li ne povis, li ne volis partopreni.*

